

Pri la aktualeco de la Zamenhofa esperantismo
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI ..., 1991.07.11 & 13

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND nome de Svisa Radio Internacia. Ni dankas la aŭskultantojn, kiuj skribis kaj ni respondas al kelkaj korespondaĵoj, kiuj kuŝas en nia leterkesto, tio laŭ la alfabeto de la familiaj nomoj.

A.- Korajn salutojn al Jiri LAUBE en Roudnice, Ĉeĥoslovakio, kiu sendis 7 mesaĝojn, al Pierre LE CALVEZ en Plérin, Francio, al la membroj de Libera Esperanto-Asocio en Düsseldorf, Germanio, kaj al Eugen MATIRKO en Košice, Ĉeĥoslovakio, kiu skribis, ke niaj elsendoj estas la plej bone aŭdeblaj en lia regiono kaj ke lia deziro estas, ke sendiĝu ĉiutage tagnovaĵoj en Esperanto, kiel okazas en aliaj lingvoj.

Cl.-Niaj prelegoj pri la formiĝo de la svisa federacio tre interesis lin kaj instigis lin mencii nesolvitajn problemojn, kiuj nuntempe maltrankviligas la politikan vivon en la ekskomunisma Eŭropo. Ni citu tiun ĉeĥan aŭskultanton Eugen MATIRKO:

A.- Viaj elsendoj pri la formiĝo de la svisa federacio kaptis mian atenton, ĉar ili estas nun tre aktualaj kaj ekzemplodonaj, ĉe ordigo de politika sistemo en nia multnacieca Ĉeĥoslovakio. Mi forte kredas, ke ŝtatlimoj en la formiĝanta unueca Eŭropo ludos nur subordigan rolon. Multloke en Eŭropo solviĝu per tio la etnaj problemoj. La ŝtatajn limojn anstataŭu etnografiaj limoj kaj per tio solviĝu la problemoj de minoritatoj. La punkto de la Helsinki-deklaro pri la neŝanĝebleco de limoj servas sole al tiuj ŝtatoj, kiuj uzurpis post tiuj du mondmilitoj teritorion de siaj najbaroj. Precipe totalismaj reĝimoj akcentas la netuŝeblecon de ŝtatlimoj. Do ili devas forfali en unu eŭropa domo. Nur unu ekzemplo. Se Kosovo estas loĝata de albanoj, ĝi apartenu sendispute al Albanio. Tute nature estos la disfalo de Ĵugoslava Federacio, se la unuopaj nacioj deziras eliri el ĝi. Tre eraris Clemenceau, kiam li subtenis la formiĝon de tiu balkana reĝlando kaj tronigis sur ĝin la serban karaĝorĝeviĉan dinastion. Dum la identeco de serboj, per sia azbuka skribmaniero kaj konfesia orientiĝo al Moskvo, estas orientslava, la horvatoj kaj slovenoj orientiĝas kulture kaj religie al Okcidento kaj Romo. Ĉe ni en Ĉeĥoslovakio estas ankoraŭ la nacieca problemoj ne plene solvita. Moravianoj kaj silezianoj postulas ankaŭ sian integriĝon en la novkreita Ĉeĥo-Slovaka federacio. Post la unua mondmilito, filozofo T. G. Masaryk, profunde trasentis la problemon de minoritatoj en la novfondita multnacieca ŝtato. El liaj skriboj oni multloke povas legi pri pliaj pensoj, ke la respubliko konsistu el kantoj laŭ la svisa modelo.

Cl.- Eugen MATIRKO per tiuj ekzemploj almenaŭ montras, kiom komplika estas la etna situacio en la ekskomunisma Eŭropo. Li ne konservu la iluzion, ke ekzemple en Svislando la limoj de la kantoj korespondas al la lingvo-limoj. Neniam ili koincidas, kaj pro tio pluraj kantoj estas du-lingvaj, kiel Valezo, Friburgo kaj Berno, kiuj estas franc- kaj german-lingvaj. Grizono estas eĉ trilingva: ĝi estas romanĉ-, ital- kaj german-lingva, kaj eĉ la romanĉa lingvo dividiĝas en 5 tre malsimilaj dialektoj. En la itallingva kanto Tiĉino estas komunumo germanlingva.

A.- Por ke kvietiĝu la etnaj kaj prilingvaj konfliktoj, la landlimoj devos esti konsiderataj nur kiel administraciaj limoj, kaj en ĉiu regiono devos esti proklamita la egaleco de ĉiuj etnoj. Sen tio ni travivos terurajn konfliktojn, kiuj prenos la aspekton de genocidoj.

Ne estas eble desegni precizajn lingvo-limojn, ĉar ĉiam la lim-urboj estas plur-lingvaj. Svislando posedas plurajn du-lingvajn urbojn aŭ vilaĝojn. La plej konataj estas Biel-Bienne, Murten-Morat, Freiburg-Fribourg, Siders-Sierre, kiuj estas german- kaj franc-lingvaj, Flims, kiu estas romanĉ- kaj german-lingva. Lingva paco povas regi en tiuj lokoj, nur se estas agnoskita la egaleco de la lingvoj kaj la rajto por la infanoj esti edukitaj en la lingvo elektita de la familio. Oni eĉ ne povas paroli pri gepatra lingvo, ĉar ofte la familioj estas dulingvaj. Povas ofte eĉ esti, ke tiu dulingveco ne korespondas al la loka dulingveco. Ekzistas en la german-franclingva urbo Bieio familioj german-ital-lingvaj, aŭ franc-ital-lingvaj.

Cl.- Zamenhof multe meditis pri tiuj problemoj kaj pluraj el liaj verkoj proponas solvojn, kiujn la esperantistoj ne sufiĉe konas kaj ne sufiĉe meditis. Ni opinias, ke alvenis la tempo tre atente analizi la politikan penson de la aŭtoro de Esperanto. Tiu penso refariĝas ege aktuala, ĉefe kiam Zamenhof proklamas la neceson doni neŭtralajn nomojn al la ŝtatoj, por ke oni ĉesu identigi ilin kun la plej multnombra etno.

A.- La "Deklaracio pri la Esenco de la Esperantismo", kiun Zamenhof verkis kaj kiu estis akceptita de la esperantistoj la 9-an de aŭgusto 1905 en laborkunsido de la unua Universala Kongreso en Bulonjo-sur-Mar, devus esti atente trastudita de ĉiuj esperanto-lernantoj.

Cl.- Ĝi estas nia Ĉarto. Sed mi bedaŭrinde konstatis okaze de prelegvojaĝoj kaj de ekzamenoj, ke malmultaj esperantistoj, eĉ esperanto-instruantoj, havas precizan nocion pri tiu baza teksto. Kiam en konkurso mi citas eron el tiu Deklaracio, informiĝante pri ĝia aŭtoro kaj pri la titolo de la verko, el kiu ĝi estas ĉerpita, tre malofte mi ricevas kontentigan respondon, eĉ de esperanto-gvidantoj. Tio montras nian malkrerecon kaj klarigas, kial la voĉo de Esperanto ne aŭdiĝas pli vigle en la nunaj politikaj debatoj prilingvaj. Jen ekzemple citaĵoj el tiu "Deklaracio pri la Esenco de la Esperantismo" :

A.- "La Esperantismo estas penado disvastigi en la tuta mondo la uzadon de lingvo neŭtrale homa, kiu "ne entrudante sin en la internan vivon de la popoloj kaj neniom celante elpuŝi la ekzistantajn lingvojn naciajn", donus al la homoj de malsamaj nacioj la eblon kompreniĝadi inter si, kiu povus servi kiel paciga lingvo de publikaj institucioj en tiuj landoj, kie diversaj nacioj batalas inter si pri la lingvo, kaj en kiu povus esti publikigataj tiuj verkoj, kiuj havas egalan intereson por ĉiuj popoloj."

Cl.- Interesatoj povas trovi la "Deklaracion pri la Esenco de la Esperantismo" je la paĝoj 33-35-aj de la naŭa eldono de la "Fundamento de Esperanto", eldonita en 1963 de Esperantaj Francaj Eldonoj. Ni konsilas la atentan trastudon de la enkonduko verkita de d-ro André ALBAUT.

A.- Por instigi niajn geaŭdantojn ekstudi aŭ restudi la penson de Zamenhof, ni citas kelkajn liajn dirojn:

Cl.- "Mi vidas en ĉiu homo nur homon, kaj mi taksas ĉiun homon nur laŭ lia persona valoro kaj agoj. Ĉian ofendadon aŭ premadon de homo pro tio, ke li apartenas al alia gento, alia lingvo, alia religio aŭ alia socia klaso ol mi, mi rigardas kiel barbarecon."

A.- Ĝi estis la dua principo de la "Deklaracio pri Homaranismo" publikigita en 1913 prepare al kongreso okazonta en Parizo en somero 1914. Bedaŭrinde la eksplodo de la milito malebligis tiun homaranan kunvenon.

Cl.- Vi legu ankaŭ la trian principon de tiu Deklaracio:

A.- "Mi konscias, ke ĉiu lando apartenas ne al tiu aŭ alia gento, sed plene egalrajte al ĉiuj siaj loĝantoj, kian ajn supozatan devenon, lingvon, religion aŭ socian rolon ili havas; la identigadon de la interesoj de lando kun la interesoj de tiu aŭ alia gento aŭ religio kaj la pretekstadon de iaj historiaj rajtoj, kiuj permesas al unu gento en la lando regi super la aliaj gentoj kaj forrifuzi al ili la plej elementan kaj naturan rajton je la patrujo, mi rigardas kiel restaĵon el la tempoj barbaraj, kiam ekzistis nur rajto de pugno kaj glavo."

Cl.- Pripensinda programo, ĉu ne? Kaj jen citaĵo el memuaro verkita por la Kongreso de la Rasoj, kiun Zamenhof titolis "Gentoj kaj Lingvo Internacia":

A.- "Ju pli la esperantismo fortiĝos en la mondo, ju pli ofte la homoj el diversaj gentoj kunvenados kaj interrilatados sur neŭtrala fundamento, des pli ili kutimos sin kompreni kaj ami, des pli ili sentos, ke ili ĉiuj havas egalajn korojn, egalajn mensojn, egalajn idealojn, egalajn suferojn kaj dolorojn, ke ĉia intergenta malamo estas nur restaĵo el la tempoj barbaraj. El tiu neŭtrala fundamento, kaj nur el tiu fundamento, iom post iom elkreskos tiu estonta unuigita kaj pure homa homaro, pri kiu revis la profetoj de ĉiuj gentoj kaj tempoj."

Cl.- Kaj por kompletigi tiun programon, jen citaĵo el la alvoko al la Diplomatoj titolita "Post la Granda Milito":

A.- "Ĉiu regno apartenas morale kaj materiale al ĉiuj siaj naturaj kaj naturigitaj loĝantoj, kian ajn lingvon, religion aŭ supozatan devenon ili havas; neniu gento en la regno devas havi pli grandajn aŭ pli malgrandajn rajtojn aŭ devojn ol la aliaj gentoj."

Cl.- En la aŭtuno ni dediĉos elsendaron al tiu profeta penso de Zamenhof, kiu devus ĉesi resti kaŝita. Ni konsciu, ke ni estas nekonsciaj portantoj de mesaĝo ege aktuala, kies kono donas al ni la forton rezisti al la lingvaj kaj etnaj ŝovinismoj.

A.- Nome de Svisa Radio Internacia salutas Claude kaj Andrée GACOND: Ĝis la reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), junio 2012*